

Novajaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Jokohama Esperanto-Rondo (JER, Hama-Rondo)

NIAJ PLANOJ

ĈE LA REGULA KUNVENEJO

En Kanagaŭa-Kenmin Sentaa (=Centro por la gubernianoj de Kanagawa), ĉirkaŭ la Stacidomo Yokohama.

*Daŭriga Kurso

Estis la Rudimenta Kurso de la 30a de oktobro lastajare, ĝis la 22a de januaro, kun 3 finintoj, gviditaj de s-ino Itabashi Micuko. La kursanoj ricevis Diplomon, en la fina tago, kaj ili daŭre lernos Esperanton, de la sama gvidanto, de la 5a de februaro, en la sama kursejo.

*Regulaj Klasoj

Ĉiusabate posttagmeze estos mezaj klasoj 1,2 kaj 3, kaj Jokohama Salono. Ĉiumerkrede posttagmeze estas la meza klaso. Pri detalo, kontaktu nin.


*Komuna Lernado

feb. 19 (sab)

16h30 - 17h00, ĉambro 603

Ĉar estas multaj klasoj aparte lernantaj, oni havos iom da tempo komune lerni. Gvidanto de ĉiu klaso alterne flegos la komunan lernadon.

En tiu ĉi tago, la klasanoj sub gvido de s-ro Doi Hirokazu, leginte la libron "Vivo de Zamenhof" prezentos la impreson pri la libro.



*Hama-Ronda Vespero

feb. 19 (sab)

17h00 - 19h00, ĉambro 603

Ĝis nun por kelkaj jaroj, oni gastigis parolanton/preleganton en aŭ ekster la rondo. Sed estas diversaj opinioj, kiel pasigi tiun tempon. En tiu ĉi kunsido, oni kunparolos kiel administri la tempon estonte.

*Foiro de la urbanaj agadoj

mar. 12 (sab)

Ĉe nia regula kunvenejo, okazas multaj agadoj de diversaj kulturaj kaj edukaj klasoj. En tiu ĉi tago, ni havos interkonan agadon, anstataŭ niaj regulaj klasoj. Detalon poste.

*Lego-kunveno

mar. 19 (sab)

14h00-16h00, en la 9a-etaĝa salono

Oni parolos impreson post legado de la libro "Ruĝa kokono", novelaro de Abe Kôbô, esperantigita de Hajaŝi Kenn.

AFIŜO-PREzentado

feb. 26 (sab)

Ĉe "Puratto Sakae", la Agado-Centro por Urbanaj de la Kvartalo Sakae, okazos ekspozicieto de la afiŝoj de la urbanaj rondoj. Tie, ni prezentos nian afiŝon, same kiel ni faris tion de la 3a ĝis la 12a de decembro lastjare en la sama loko.

■ Eldonas Aida Yayoi ■ Redaktas la organa fako de JER: Miyazaki Hideko

■ Poŝtadreso: n-ro 85 CPO, Yokohama, Japanio (JP-220-8691) ■ Telekopio: +81-45-785-5458

■ Retadreso: hamarondo@yahoo.co.jp ■ TTT-ejo: <http://www.hamarondo.org>

■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-j (Jokohama Esperanto-Rondo)

LETERO

el Nepalo

Estimataj ges-roj,
Saluton! Tre afable ricevis kiel kutime senkoste “Novaĵoj Tamtamas”, la internacian gazeton de Jokohama Esperanto-Rondo. Mi havas bonan kaj grandan memoron pri la organizo, pri la bonaj personoj kiel d-ro Fuzita, la edzino kaj la filo, kaj aliaj. Ili tre afable vizitis mian hejmon kaj kune manĝis hejme preparitajn nepalajn manĝaĵojn.

Mi eksciis pri la informoj koncerne al la 97a Japana Esperanto-Kongreso, kiu okazis en Nagasako, pri kiu “Novaĵoj Tamtamas” priskribis en la n-ro 254, novembre 2010.

Ankaŭ mi legis pri s-ro Nitobe kaj pri Nepalo. Venontjare kiam Nepalo aktivas agade por la promocio de turismo, mi esperas renkonti multajn esperantistojn kaj establi amikecon tra la internacia lingvo Esperanto.

Amike kaj sincere mi atendas vian respondon,
Gambir Man Srestha



Zamenhof-Festo 2010

En la 11a de decembro, 2010, la 40a Zamenhof-Festo en Kanagaŭa prenis lokon en halo en Jokohamo. Kunvenis 51, el la rondoĵoj en la gubernio, nome Jokohamo (Yokohama), Kawasaki, Syoonan kaj Odawara. Gastprelegis d-ro Ulrich Lins pri la libro “Vivo de Zamenhof”.





ESEĴOJ

Du vizitoj en Seulo (2)

Mizro Iwaya

[Korea Esperanto-Asocio]

Vi ĉiuj scias ke Korea Esperanto-Asocio funkcias kiel landa asocio de UEA. Ĝia sidejo troviĝas apud la stacio Mapo, sud-okcidenta parto de Seulo. Ĝi estas en granda apartamentaro nomata Kangbjonhansin-koa, en la 16a etaĝo, ĉambro 1601. Mi vidis ke ankaŭ tiu ĉambro estas sufiĉe granda, komparebla al unu etaĝo de JEI. S-ino Min Hyeon-kyeong, ĝenerala sekretario de KEA, laboras tie de lundo ĝis vendredo. Ĉu vi scias ke koreaj esperantistoj kutime havas sian esperantan nomon. Ŝia nomo estas "Honesta". Jes, mi trovis ŝin honesta kaj sincera junulino ne nur nome sed ankaŭ persone. Kiam mi rakontis al ŝi ke mi venis al Koreio por la koopera laboro pri magnetleva trajno, ŝi demandis min kia estas mia opinio pri tiu projekto. Tio sugestis al mi ke ŝi havas dubon pri la ŝtata strategio al industria disvolviĝo. Mi bone komprenas ŝian timon, ĉar ĉiu komenco estas ambigua kaj dubiga. Estis al mi aparta ĝojo ke mi poste, dum la japana kongreso, renkontis ŝin refoje, ĉar ŝi partoprenis en ĝi. KEA havas ĉirkaŭ 250 membrojn. Ĝia unika strukturo estas ke pli ol la duono estas dumvivaj membroj. Mi supozas, ke tia strukturo helpas al KEA havi sian propran apartamenton. Laste mi volas atentigi al vi ke la superspekto el la 16a etaĝo estas grandioza. Tuj antaŭ la fenestro etendiĝas granda rivero nomata Hangang. Mi volas diri al vi ke KEA meritas vian viziton eĉ sole pro tiu spektaklo!

Nova tasko panikigis...

SIBAYAMA Noriko

De tiu ĉi jaro mi akceptis la taskon enpaĝigi gazetojn "La Tamtamo" kaj "Novaĵoj Tamtamas". Laŭ la antaŭulo mia okupo estas nur meti artikolojn, kiuj venos de redaktoro. Sed efektive...
Mi estis en paniko komence de la jaro, ĉar tute ne venis artikoloj de la redaktoro. Ordinare

antaŭ kiom da tagoj de ekspedo mi ricevu ilin? Kiom da tagoj oni donas al mi por enpaĝigo? Mi tiam rimarkis, ke mi tute ne certigis la antaŭulojn pri tiaj detaloj. Senpacience mi demandis rete la redaktoron, "kiam mi ricevos artikolojn?" Sed ne venis respondo.

Intertempe mia edzo helpe sendis per reto materialojn por la gazetoj. Sed tamen ĝi ne atingis min. Li denove sendis la samon, sed vane. Do, prove li sendis mallongan mesaĝon al mi, kaj ĝi sukcese atingis. Kio okazis? Eventuale reta akcidento? Ĉu pro tio mi ankoraŭ ne ricevis artikolojn? Mi tuj leteris al telefona adreso de la redaktoro, kaj petis sendi artikolojn. Post nelonge respondo venis. Ŝi resendis retleteron, kiun ŝi jam antaŭ 5 tagoj sendis al mi. Finfine mi ricevis materialon por la gazetoj.

Tiutempe restis nur unu semajno ĝis ekspedo de la gazetoj. Mi estis preskaŭ en paniko. Mi dubis ĉu ni povos ekspedi laŭ la plano? Tiam venis vortoj de la redaktoro, "Mi ne insistas la planon", kiu malpezigis mian koron, kaj mi povis koncentriĝi en enpaĝigo. Ĉu pro la konvena kvanto de la artikoloj, ĉu pro helpo de mia edzo, ĉu pro mia antaŭpreparo, mi sukcesis finenpaĝigi dum du tagoj!

Fininte ĉi-fojan enpaĝigon mi pensas jene: Mia tasko ne estas simpla enpaĝigo, kaj bezonas iom da redaktokapablo. Sen helpo de mia edzo, mi malfacile plenumis(os) mian taskon. Ĉar mi ankoraŭ ne bone scias Hama-Rondon pro mallonga membreco, aliflanke mia edzo pli bone scias malgraŭ sia nominala membreco. Pro tio li povas verki ŝtopaĵon laŭ spaco, sed mi ne kapablas. Nur enpaĝiga kapablo ne ebligas la taskon.

Do, ĉu mi pentas akcepti la laboron? Ne, tute male. Mi ĝojas, ke mi denove povas plenumi ŝatatan taskon post mia ekslaboro. Mi volonte ellernos la enpaĝigan programaron, kiun ĝis nun mi nur posedis.

BELETRO

Orienta violono de Minoru (Parto 2)

verkis Satoo Haruo

tradukis AIDA Kiyoshi

La patrin-flanka avino jam loĝis en la hejmo de mia patro. Tiam ŝi eble estis 70-jara. Kiam mi iris al ŝia ĉambro, ŝi demandis min pri diversaj aferoj. Neniu ŝatis paroli al la avino, ĉar ŝi havis malbonan orelon. Sed mi ne malŝatis ŝin. Ŝi kutime diris, ke mi estas bonkora knabo, ĉar mi ne evitis paroli kun ŝi. La avino ofte demandis min pri neatenditaj aferoj. Fojfoje ŝi demandis tiel: "Ĉu tio estas vera, ke la mondo estas ronda." Aŭ, "Kiu vidis tion?" Aŭ, "Kie Usono troviĝas? Tie aŭ ĉi tie?" Ŝi demandis min montrante perfingre. Mi foje embarasiĝis, ĉar ŝi demandis min pri malfacilaĵoj.

La avino ofte parolis pri Usono. Ŝi havis la kialon pri tio. La plej aĝa filo de la avino, kiu estas pli aĝa frato de mia patrino, aŭ mia onklo, havis edzinon, kies pli aĝa frato loĝis en Usono kiel kuracisto. Ankaŭ Minoru estis en Usono. La avino volis scii informon pri Usono, kie loĝis ŝiaj du parencoj. Tamen tio min surprizis eĉ nun, ke tia maljunulino demandis min ĉu la terglobo estas ronda.

Onidire Minoru, kiu enmigris en Usonon, perlaboris por studado lavinte telerojn kaj plukinte vinberojn. Laŭdire li diligente laboris dum someraj ferioj kaj alitempe iris al lernejo. Minoru ne sendis leterojn tre ofte, sed fojfoje skribis al ni. Do, ni povis imagi lian vivon en Usono. Mia patrino ofte diris al ni, "Li estas admirinda."

Kelke da jaroj jam pasis post kiam Minoru enmigris en Usonon. Iun tagon, eble ĉe la jarfino, la tutfamilianoj ĉirkaŭ hibaĉo en la manĝoĉambro maltrankviliĝis leginte la leteron el Usono. Ĉar mi estis 13-jaraĝa, mi bone komprenis tiun maltrankviliĝon. Aldone al la letero de Minoru venis al ni la sciigo el la parenco en Usono, ke Minoru malsaniĝis. Li suferis de severa ftizo. Li volis reveni Japanion, sed mankis al li vojaĝkosto. Laŭ la informo bonkoraj homoj favore donos portempan monon por la vojaĝo.

Post unu monato kaj duono de kiam ni ricevis la leteron de Minoru, Minoru revenis hejmen je la 10-a matene. Tiam mi estis hejme eble pro ferio. Kiam mi ludis en la ĝardeno, granda homo portanta longan palton envenis en la ĝardenon kun valizo. Mi pensis, ke li estis Minoru. Minoru ridetis al mi kaj la rido estis tiu de alilandano. Vidante Minoru mia patrino diris, "Vi aspektas pli sana ol mia supozo." Poste mia patro ekzamenis la korpon de Minoru kaj li diris nur al niaj familianoj, "La stato de lia sano ne estas tre bona!" Minoru ripozis portempe en la izolita ĉambro. La patro ordonis al ni fratoj, "Vi knaboj atentu, ĉar li suferas pro infekta malsano." (Daŭrigota)

**Redaktanto
petas**



Nun mankas materialoj, pro tio Redaktanto embarasiĝas kiel ŝtopi spacon. Skribu kaj sendu vian manuskripton al redaktejo. Karaj novuloj, komencantoj kaj hezitemuloj, ni atendas vian verkon. Komprenoble veteranoj kaj ĉiamuloj estas bonvenaj. Ĝojigu nin pro inundo da materialoj de vi, legantoj.